



N-ro 21/1974 17 jun 1974
Aperas ĉiusemajne

M Ĉ 74

Mondĉampionado pri Futbalo 1974

Nürnberg (pp) La tuta mondo febras pro futbalo. En ĉiaj lingvoj diskonigas - televide, radie kaj gazetare - la novaĵoj kaj informoj de tiu mondoskua evento. Pilo-Press ne volas ignori ĉi tiun sportan aranĝon kaj dediĉas ĉi tiun numeron al futbalo kaj la mondĉampionado.

Kvankam Pilo-Press ne povis realigi sian originan intencon eldoni plurlingvan futbalan frazaron, tamen ni esperas, ke per tiu ĉi bulteno ni povas kontribui al la disvastigado de la sporta lingvo en Esperanto. Pro tio ni kolektis kelkajn futbalajn esprimojn kaj proponas ilin al la esperantistoj en formo de unupaĝa terminaro. Kiel fonton ni uzis la verkon de Tibor Ujlaky-Nagy "La Sporta Lingvo en Esperanto", la broŝuron "Saluton amiko" de Ralph Harry, la biografian verkon "Mi estas Pelé" kaj la elsendojn de Pola Radio, speciale la komentojn de Jerzy Grum.

Kelkaj historiaĵoj

Kvankam oni ludas diversajn formojn de piedpilklo jam de pli ol 2 000 jaroj, la moderna historio de futbalo komenciĝis en la jaro 1863 per la fondo de la angla "Football Association" (Futbala asocio). La unua mondĉampionado pri futbalo okazis en la jaro 1930. Jen mallonga historia skizo ĝis 1974:

1930 en Urugvajo: Finalo Urugvajo - Argentino 4 : 2

1934 en Italio: Finalo Italio - Ĉeĥoslovakio 2 : 1

1938 en Francio: Finalo Italio - Hungario 4 : 2

1950 en Brazilo: Finalraŭndo de la grupvenkintoj:

Brazilo - Svedio 7:1, Urugvajo - Hispanio 2:2,

Brazilo - Hispanio 6:1, Urugvajo - Svedio 3:2,

Svedio - Hispanio 3:1, Brazilo - Urugvajo 1:2

Unua kaj mondĉampiono: Urugvajo kun 5:1 poentoj, 7:5 goloj

1954 en Svislando: Finale FRG - Hungario 3:2

1958 en Svedio: Finalo Brazilo - Svedio 5 : 2

1962 en Ĉilio: Finalo Brazilo - Ĉeĥoslovakio 3:1

1966 en Anglio: Finalo Anglio - FRG 4:2 post plilongigo

1970 en Meksikio: Finalo Brazilo - Italio 4 : 1

1974 en Federacia Respubliko Germanio: Finalo ? - ?

Grupo 1

Grupo 2

Grupo 3

Grupo 4

Ĉilio

Jugoslavio

Nederlando

Haitio

FRG

Brazilo

Urugvajo

Italio

GDR

Zairo

Svedio

Pollando

Aŭstralio

Skotlando

Bulgario

Argentino

La ludoj de la unua raŭndo

- Grupo 1: Federacia Respubliko Germanio - Ĉilio 1:2 en Berlino
Germana Demokratia Respubliko - Aŭstralio 2:0 en Hamburgo
- Grupo 2: Brazilo - Jugoslavio 0 : 0 en Frankfurto
Skotlando - Zairo 2 : 0 en Dortaŭndo
- Grupo 3: Nederlando - Urugvajo 2 : 0 en Hanovro
Svedio - Bulgario 0 : 0 en Düsseldorf
- Grupo 4: Italio - Haitio 3 : 1 en Munkeno
Pollando - Argentino 3 : 2 en Stuttgart

La stato post la unua raŭndo

Grupo 1:	Poentoj	Grupo 2:	Poentoj
1. GDR	2:0	1. Skotlando	2:0
2. FRG	2:0	2. Brazilo	1:1
3. Ĉilio	0:2	3. Jugoslavio	1:1
4. Aŭstralio	0:2	4. Zairo	0:2

Grupo 3:	Poentoj	Grupo 4:	Poentoj
1. Nederlando	2:0	1. Italio	2:0
2. Svedio	1:1	2. Pollando	2:0
3. Bulgario	1:1	3. Argentino	0:2
4. Urugvajo	0:2	4. Haitio	0:2

La plej granda surprizo en la unua raŭndo sendube estis la ludo Pollando - Argentino. Kiu ankoraŭ opiniis, ke la pola teamo per nura bonŝanco dum la ludo kontraŭ Anglio atingis la kvalifikon por la mondĉampiona turniro, devis konvinkiĝi, ke la poŝoj scipovas ludi bonan eŭropan futbalon. Ĉiuj komentistoj kaj raportistoj interkonsentis en tio kaj oni povis legi kaj aŭdi preskaŭ nur laŭdojn. Eĉ la Springer-gazeto "Bild am Sonntag" komentis: "Kaj la Olimpia gajninto kaj venkinto kontraŭ Anglio brile superatutis de la komenciĝo kaj decidis la ludon dum 8 minutoj." Fakte ankaŭ por mi tiu ludo estis la plej interesa, kaj kiam avanulo Lato elŝotis la unuan golon en la sesa minuto, mi aŭtomate eksaltis. Sendube la nomoj Lato, Szarmach, la du golfarantoj, kaj la pola Beckenbauer, Deyna de Legia Varsovia, estas nuntempe la plej ofte citataj futbalistoj. Sed surprizis ankaŭ la aŭstralia teamo, kiu kadzis al la GDR-teamo grandajn malfacilaĵojn malgraŭ la fina rezulto de 2:0 favore al GDR.

La rezultoj de la unua raŭndo montras, ke la sudamerikaj teamoj ne nepre plu estas favoritoj de la turniro. La samon oni devas diri de la teamo de Federacia Respubliko Germanio, kiu certigis sin la venkon kontraŭ Ĉilio nur per la golo de arierulo Breitner. La golĉasanto*sendube ne jam atingis sian "kondicion". *Müller

Futbalo en la Esperanto-elsendoj

Mi estas konvinkita, ke ankaŭ esperantistoj kun granda intereso sekvas la futbalan turniron kaj ke inter la esperantistoj ankaŭ estas zelotoj kaj futbalaj fanatikuloj, aŭ eĉ futbalistoj mem. Sed kio mirigas, tio estas la fakto, ke la Esperanto-movado kaj organizaĵoj ignoras la fenomenon "sporto" kaj speciale nun futbalon. La movado kaj ĝiaj gvidantoj estas okupataj tro multe kaj tro miope pri pli aŭ malpli bagatelaj aferoj de la "verda mondo" malantaŭ la "verda kurteno". Tion konstatis Jerzy Grum en unu el siaj felietonoj sub la nomo "Niaj problemoj". Pola Radio kelkfoje jam raportis pri la "evento de la jaro". Aktuala kaj interesa estis la Grum-a komentario pri la ludo Pollando - Argentino en la dimanĉa posttagmeza elsendo.

Konversacio inter Tip kaj Tap



Tip: Kion ni faru post la futbala mondĉampionado?

Tap: Ni lernu Esperanton!

Tip: Kion ni lernu? Esperanton...? Tiun lingvon, kiun mi entute ne aŭdis dum la nuna ĉampionado! Kaj fakte la tuta Esperantomovado ignoris nin kaj futbalon!

Tap: Tip, vi ne estas justa kaj vi malpravas! Mi aŭdis kelkajn Esperanto-vortojn, kaj ili ege plaĉis al mi. Estas ekzemple simpatia skoto....

Tip: Tap, vi eraras, ne estas skoto, sed estas skotino kun barbo... sed ĉu simpatia?

Tap: Ne enmiksiĝu en kverelojn, mia karulo, krome vi fakte eraras. Mia simpatia skoto nomigas Tom Mattison kaj estas granda amanto de futbalo. Li jam ofte skribis leterojn en Esperanto pri futbalmatĉoj al Pola Radio.

Tip: Nu bone, kion signifas unu Esperanto-skoto por futbalo. Ĉu pro li ni lernu Esperanton?

Tap: Ne estas nur li. Mi konas alian. Kvankam li estas "honora bavaro", li ne estas nigra, sed pola. Temas pri Jerzy Grum, la konata Esperanto-redaktoro de Pola Radio. Li jam kelfoje raport felietonis, komentis pri futbalo en Esperanto. Jam dimanĉe, do unu tagon post la grandioza ekscita matĉo inter Argentino kaj Pollando li donis interesan komenton pri tiu ludo sur la Varsoviaj Ondoj kaj ĉiuj esperantistoj en Eŭropo povis lin aŭdi - se ili volis!

Tip: Bone, bene..estas Mattison, Grum..., sed estas miliardoj da homoj en la mondo!

Tap: Ne malpacientiĝu! Estas tria homo, antipodulo, eminenta esperantisto. Pri li eĉ skribas "Hamburger Abendblatt" en la rubriko "Gäste in Hamburg" (Gastoj en Hamburgo). Jen legu mem:

<p>Mem: Ralph Harry, aŭstralia Botŝafisto in Bonn (Fußballweltmeisterschaft);</p>	<p>Vier Jahreszeiten Hotelo Kvar Sezonoj; Ralph Harry, aŭstralia ambasadoro en Bonn (Futbala Mondĉampionado)</p>
---	--

Tip: Nun vi preskaŭ konvinkis min! Sed ĉu inter la esperantistoj ankaŭ estas futbalistoj, teamoj?

Tap: Ĉu vi kredas aŭ ne! Estas..., inter la fervojistoj. Nur antaŭ kelkaj semajnoj ekipo de IFKP ludis en Tarragona kontraŭ loka teamo. Kaj la nuna ĝenerala sekretario de UEA, Günther Becker, iam en siaj pli junaj jaroj futballudis en TEJO-teamo dum kongreso en Varna.

Tip: Nun vi plene konvinkis min! Do, tuj post ĉi tiu ĉampionado ni eklernos Esperanton. Kaj la esperantistoj miros pri niaj sukcesoj kaj niaj top-goloj. Sed unu afero ankoraŭ turmentas min: Ĉu la Esperanto-gazetaro raportos pri ni kaj pri futbalo?

Tap: Pri ĉiuj mi ne povas garantii! Sed certe skribos Pilo-Press kaj ne forgesu - certe raportos Pola Radio!

Tip: Bonege! Ni diligente lernu kaj agu! Baldaŭ ja estos la Olimpiaj Ludoj en Montrealo, 1976, kaj tie ni volas ĉeesti, espereble kun Esperantaj nomoj!

Tap: Mi konsentas! Ni kampanju por Esperanto en la Olimpiaj Ludoj kaj Futbalo kaj en la tuta sporto!

Malgranda terminaro pri futbalo (piedpilkludo)

Angulo: angulareo, angulflago, angulŝoto

Arierulo (defendanto): dekstra arierulo, maldekstra arierulo, arierula linio = linio de la arieruloj

Ataki: Atakludisto, atakludo

Avanulo (atakanto, sturmanto): avanula linio = linio de la avanuloj, dekstra avanulo, maldekstra avanulo, meŝdekstra avanulo, mezmaldekstra avanulo, meza avanulo (centravanulo, centrulo)

Ĉampiono: ĉampionkonkurado, Futbala Mondĉampioneco, ĉampionado

Defendi: Defendludisto, defendludo

Dribli: dribli la pilkon (superruzi la kontraŭulon), driblo (Pelé ravis per siaj diablaj dribloj)

Duontempo: Unua duontempo, dua duontempo

Egalstato = remiso

Enĵeto: enĵeti la pilkon

Finalo: Final-okonoj, final-kvaronoj, final-duonoj

Flanklinioj: la pilko estas ekster la flanklinio

Posto: golfosto, flankposto, kverfosto, la pilko fuŝe ŝotita de la meza avanulo resaltis de la dekstra flankfosto

Futbalo = piedpilkludo: futbalekipo, futbalekipo, futbalteamo, futbaldekunuo, futbali = piedpilkludi

Golo: golejo, golulo, golfaranto, golĉasanto, goleja areo, elbatali golon, atingi golon, fulmaj goloj

Halfo: mezludisto, mezulo (helpas aŭ al la arierulo aŭ al la avanulo) halfa linio = linio de la halfoj, dekstra halfo, meza halfo, maldekstra halfo

Juĝisto: arbitracianto, futbaljuĝisto, linijuĝisto

Kapumi: kapumi la pilkon, kapludo, kapobato (golo per sensacia kapobato)

Kiki: elkiki la pilkon = elsendi la pilkon per piedfrapo

Ludi: ludkampo, kampludisto, atakludo, defendludisto, vetludi, ludotempo

Ludsistemoj: klasika: 1 golulo, 2 arieruloj, 3 halfoj, 5 avanuloj, moderna sistemo: 1 - 4 - 2 - 4

matĉo: maĉo, ludo

ofsajdo: la ludisto ofsajdas, estas en ofsajdo, en ofsajda pozicio

pasigo: pasigi, la purigisto pasigis la pilkon de la arierula linio al la meza avanulo, duobla pasigo

Pokalo: La ĉampiono ricevas la pokalon "Jules Rimet"

Pozicio: libera pozicio, nekovrata, poziciŝanĝoj

Punareo: punpunkto, punŝoto

Sankcioj: Atentigo, punŝoto, libera ŝoto, rekta libera ŝoto, ne-rekta libera ŝoto, ekskludo, ĉesigo de la matĉo, flava karto, ruĝa karto

Ŝoti: libera ŝoto, liberiga ŝoto, punŝoto,

Trejni: trejni la teamon, trejnisto, ĉeftrejnistoj.